

Eduard Ebel,
Milde falas la neg'

tradukita de N. N. 01

Milde falas la neg',
Lago silentas en preĝ',
Arboj en brilblanka vest'.
Ĝoju pri kristnaska fest !

Nun varmiĝas la kor',
Ĉesas ĉagren' kaj dolor',
Ĝoju pri Dia ĉeest'.
Ĝoju pri kristnaska fest!

Sankta nokto de Di',
Vekas anĝelhoron ĝi,
Sonias ĉarmega atest':
Ĝoju pri kristnaska fest'!

*Traduko de la Germana poem-o "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, *1839 – †1905) en Esperanton de N. N. 01.*

MR-012-NN-1 / Arg-99-201
(2003-12-11 08:46:13)

MR-012-NN-1

Eduard Ebel,
Flustre falas la neg'

tradukita de Josef Kühnel

Flustre falas la neg'.
Lag' rigidas laŭ leg'.
Kristfeste brilas arbar'.
Ĝoju pri Kristo, homar'!

Varma estas en kor'.
Foras ĉiu dolor'.
Fugas la vivoamar'.
Ĝoju pri Kristo, homar'!

Sankta nokta lumbril'
kaj ĉiela jubil'
logas laŭ ĉarma fanfar':
Ĝoju pri Kristo, homar'!

*Traduko de la Germana poem-o "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, *1839 – †1905) en Esperanton de Josef Kühnel.*

MR-012-JK-1 / Arg-99-202
(2010-09-18 19:50:56)

MR-012-JK1

Eduard Ebel,
Negas nun ĉie ĉi

tradukita de Manfredo Ratislavo

Negas nun ĉie ĉi,
lagon kovras glaci',
brilas kristnaske arbar'.
Ĝoju vi, ho kristanar'!

Varma estas la kor',
malaperas dolor',
venas savant' de l' homar'.
Ĝoju vi, ho kristanar'!

Malleviĝis la sun',
sankta nokt' estas nun,
kantas por ni angelar':
Ĝoju vi, ho kristanar'!

*Traduko de la Germana poem-o "Leise rieselt der Schnee" de EDUARD EBEL (Eduardo Ebelo, *1839 – †1905) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04).*

Arg-99-199 (2003-12-11 08:30:04)

MR-012-3